

NIA PONTO

Grupo Esperantista

Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre

48005-BILBAO (Hispanio)

Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jmgiaa@gmail.com)

TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>

En Fejsbuko, serĉu “esperanto grupo bilbao”

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ esperantobi@gmail.com

Jar-kotizoj: Normala: 60 €. Familia: 70 €.

KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550

JULIO/SEPTEMBRO 2017


Nro. 112 (3/17)



Alvenas aŭtuno ...

la sezono kiam falas la arbofolioj (eĉ la akcento sur la “u” en la supra afiŝeto), kiam taglumo iĝas malpli hela kaj kiam malvarmo eksentiĝas ĉie, kiam feriado jam finiĝis kaj kiam oni nostalgias pri la forpasinta somero ...

Tamen, estas la momento kiam nia E-Grupo komencas denove vivi: homoj denove vizitas ĝin por kunveni la vendredojn, la E-kurso daŭrigas dank’ al la laboro de nia amiko David kaj al entuziasmo de liaj gelernantoj, baldaŭ ni komencos la vendadon de kristnaska loterio, ...



Ni atendas vin ĉiujn la vendredojn, inter la 19:30 kaj 21:00 h.

HISPANA KONGRESO EN TERUEL.

De la 23-a ĝis la 25-a de junio disvolviĝis en Teruel la 76-a Kongreso de HEF (Hispana E-Federacio). Ĝis tiu urbo veturis 5 membroj de nia E-Asocio, kiuj havis la okazon ĝui amikeman etoson kaj viziti la interesan monumentojn de la loko, kie troviĝas multnombraj restaĵoj de la mudehara arto.

La organizantoj ankaŭ okazigis diversajn prelegojn pri la fama “batalo de Teruel”, ene de la hispana interna milito (1936-1939), kun vizito de la stratoj kie ankoraŭ videblas restaĵoj de tiu terura batalo. Ankaŭ estis ekskurso al bela urbeto Albarracín.

Pri E-novaĵoj, kiuj rilatas al nia Grupo, ni menciis du:

- Estis prezentata la libro “la calle Zamenhof”, kies traduko al la hispana estis kunordigata de nia nuna sekretario, Jesús.
- Jesús ankaŭ estis nomumata nova kasisto de HEF.



Jesús, Iciar kaj Paco sur la kongresa podiumo



Jesús, Octavio, Iciar kaj Paco ĉe la kongresejo



Jesús, Iciar, José Ignacio kaj Paco dum la inaŭguro de la placo “Esperanto”

ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Tiel kiel oni anoncis, la vendredon 26-an de majo oni okazigis la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Bedaŭrinde ĉeestis ĝin nur 8 homoj, sed tamen la diskutoj estis fojfoje sufiĉe viglaj kaj interesaj.

Oni aprobis, unuanime, la spezoj de la jaro 2016 kaj la buĝeto por la jaro 2017. Samtempe, oni esprimis la plej koran dankon al nia amiko David pro la organizado kaj gvidado de la nova kurso.

LOTERÍA DE NAVIDAD.



Ya hemos reservado la lotería de Navidad. Este año, el número es el 03382. Esperamos que, para mediados de octubre, estén ya listas las habituales papeletas, totalmente escritas en Esperanto.

Como siempre, toda la ayuda que recibamos para su venta será

bien recibida.

El año pasado ya nos tocó. Este año, ya entrenados, vamos a por “el gordo”.

Y recordad que **no se reserva**, así que, cuanto antes se compre, mejor.

NIA E-GRUPO EN INTERRETO.

Ne forgesu ke nia E-Grupo troveblas ankaŭ en fejsbuko, sub la nomo “esperanto grupo Bilbao”.

Kaj ke nia TTT-ejo estas <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>.

Fine, nia retadreso: esperantobi@gmail.com

Kaj ni ne forgesu ankaŭ la senlakan laboron de nia Prezidanto, Paco, dank’ al kiuj nia Grupo ekzistas en interreto.

CUOTAS DEL AÑO 2017.

Cuando queráis, podéis hacer el pago de vuestra cuota anual. El número de cuenta está en la primera página de este "Nia Ponto". Y no olvidéis **las cuotas vigentes**:

Cuota normal: 60,00 € anuales. (5 € al mes)
Cuota familiar: 70,00 € anuales. (5,83 € almes)

VENONTAJ E-ARANĜOJ.

12-15 okt. 2017. 21-a andaluzia kongreso. Torrox (Málaga).

20-22 jul. 2018. 17-a kongreso de Hispana E-Federacio. Madrido.

21 – 28 jul. 2018. 51-a Kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) - en Madrido. Kongresa temo "La kultura heredaĵo de Esperanto". El la programo: Interkona frandvespero, instruista trejnado, E-kursoj por komencantoj kaj komencintoj, prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj, lingva festivalo, simpozio pri la konferenca temo, konferenca bankedo, distraj vesperoj, literatura kafejo, ekskursoj. Post la fermo, karavana transiro al UK en Lisbono.

28 jul-04 aŭg. 2018. 103-a Universala kongreso en Lisbono (Portugallio).

04-11 aŭg. 2018. Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO, en Badajoz.

05-12 aŭg. 2018. SAT-kongreso - en Kragujevac, Serbio. Ĉeftemo: Esperanto kaj transnacia komunikado en la inform-teknologia epoko. Riĉa faka, kultura kaj turisma programo. Ĉefprizorgantoj: Saša PILIPOVIĆ kaj Radojica PETROVIĆ

Kompleta kalendaro pri E-eventoj, okazintaj kaj okazontaj, en:
<http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO.



25-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO
DE LA KULTURO KAJ TURISMO
DE LA 30-a DE SEPTEMBRO ĜIS
LA 7-a DE OKTOBRO 2017

TOSSA DE MAR

1993 NIAJ SEMAJNOJ	2001 SANKTA MARINA	2010 LIGONT DE MAR
1994 SANKT ĜUSTO DEL VALLES	2002 SALDO	2011 BALCO
1995 SIKILO	2003 GALISA	2012 POCOL
1996 OKLELLA DE	2004 LA PIEDA	2013 COMEPEL
1997 KALIFA DE LA PAPER	2005 TOSSA DE MAR	2014 VIKO DE MAR
1998 OKLELLA DE	2006 ALDO	
1999 KAMBALS	2007 PIEDA DE MAR	
2000 SANKT DE	2008 TOSSA DE MAR	
2001 LIGONT DE MAR	2009 MALIGONT DE MAR	
2002 KAMBALS	2010 COMEPEL	

Unu el la plej tradiciaj kaj sukcesaj renkontiĝoj organizataj en la Iberia Duoninsulo, la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, atingas en 2017 sian 25an eldonon, kun nova organiza skipo.


En tiu ĉi jaro ĝi okazos de la 30a de septembro ĝis la 7a de

oktobro en la urbo Tossa de Mar, en la t.n. 'Costa Brava' (laŭlitera: Sovaĝa Marbordo, duonvoje inter Barcelono kaj la franca landlimo). Ĉi tiu bela urbeto, antaŭe fiŝkaptista vilaĝo, nuntempe estas plejparte turisma loko, tre vizitata.

Pliajn detalojn kaj aliĝilon oni povas trovi ĉe: [https://kulturacentro.blogspot.com/es/](https://kulturacentro.blogspot.com.es/)

(La Bitbulteno de HEF. Nro. 35. 12/03/2017)

LA ZAMENHOF-STRATO EN LA HISPANA.



Dum la kongreso en Teuel estis prezentata la hispanlingva traduko de la libro “La Zamenhof-strato”. Temas pri verko de la pola ĵurnalisto Roman Dobrzyński (sur la dekstra foto), eldonita origine en la pola kaj en Esperanto, kaj nun tradukita okaze de la datreveno de la forpaso de la iniciatinto de la internacia lingvo D-ro L.L. Zamenhof. La aŭtoro mem, granda amiko de Hispanio, partoprenis la kongreson kaj, kompreneble, la prezentadon de la libro.



Jam antaŭe, la verko estis prezentata en Madrido kunlabore kun la Pola Kulturinstituto kaj la Centro Sefarad-Israel, por la juda kulturo, kun ĉeesto de la aŭtoro, la 20an de junio, kaj la 22an de junio estis prezentata ankaŭ en Zaragozo, en la Biblioteko de Aragono.

La traduko, farita de tri homoj, estis kunordigata de la membro de nia Grupo, Jesús M. García, kaj reviziata de Toño del Barrio.

FORPASIS NIA AMIKO LUIS SERRANO.



Luis Serrano kun bilbaoanoj en Malago-2009

Antaŭ tri tagoj forpasis Luis Serrano Pérez, veterana aktivulo en la movado en Hispanio kaj en la komunistaj E-organizaĵoj kaj lastatempe ĉeforganizanto de la Internacia Semajno pri Kulturo kaj Turismo en Katalunio.

Oni planis omaĝon al li dum venonta Semajno, en Tossa de Mar fine de septembro.

Li estis 91-jara kaj sufiĉe vigla ĝis antaŭ kelkaj monatoj. Li pace ripozu,

(Hispana Esperanto-Federacio. 27/08/2017)

Luis Serrano naskiĝis en Osorno (Palencia) en 1926 kaj estis ege aktiva esperantisto, grava organizanto de la loka movado en la kataluna urbo Sabadell. Serrano profesie estis masonisto. Li esperantistiĝis en 1953 pere de “Kurso per korespondado” kiun gvidis Ramón Molera Pedrals. La jaron 1954 li translokiĝis al Asturio (Avileslo kaj Hiĥono), kie li ekaktivis loke. Poste li elmigris al Germanio kaj poste al Francio, dum entute tri jarojn. Li edziĝis al esperantistino el Sabadell, kaj translokiĝis al tiu urbo, kreante esperantistan familion.

LOTERIBILETO DEDIĈITA AL ZAMENHOF.

Kiel oni informis antaŭ kelkaj monatoj, la Nacia Organizaĵo de hispanaj Blinduloj (ONCE) eldonis ekzempleron de sia konata loteribileteto omaĝantan D-ron Zamenhof, okaze de la centa datreveno de lia morto. La elektita tago estis la 8a de aŭgusto.



(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 39. 13/07/2017)

Omaĝo al aŭstraj infanoj gastigitaj post la Unua Mondmilito.

En Cheste (Valencio) oni programis serion da aktivaĵoj omaĝe al la aŭstraj infanoj gastigitaj post la Unua Mondmilito en Hispanio, pro iniciato de la esperantistoj de diversaj urboj. Oni programis aktivadojn por pripensi pri la migrado. Vidu la programon en la apuda afiŝo.

<https://www.facebook.com/esperanto.es/posts/1759556340738339>

<http://www.elperiodicodeaqui.com/noticias/Cheste-homenajeaaustriacos-acogidos-enmunicipio-trasl-Guerra-Mundial/139491>

(HEF. 10/09/2017)

HUMURAĴOJ

Virino aĉetas vestaĵo-ŝrankon ĉe IKEA, portas ĝin hejmen kaj muntas en la dormĉambro. Preterpasas tramo antaŭ la domo, la ŝranko komencas vibri kaj disfalas. Ŝi remuntas la ŝrankon, sed dum la venonta preterpaso de la tramo denove la ŝranko disfalas. Ŝi do decidas alvoki ĉe IKEA kaj mendi teknikiston por munti la ŝrankon.

Venas la teknikisto kaj denove muntas la ŝrankon, tute zorge. Fine li eniras la ŝrankon por iomete subteni la bretojn, kaze ke la venontatramo denove vibrigos la ŝrankon kaj disfaligos ĝin - ja ne damaĝiĝu la bretoj. Tiumomente hejmenvenas la edzo de la virino, eniras la dormĉambron, vidas la teknikiston de IKEA en la ŝranko kaj tuj demandas:

- "Kion vi faras tie ĉi?"
- "Nu", respondas la teknikisto, "vi certe ne kredos ĝin, sed mi atendas la tramon."

(Lu Wunsch-Rolshoven. *Kaptita en Interreto*)

Iu renkontas amikon, kiu portas tri grandajn botelojn: sur du estas skribite: "hidrogeno", sur la tria "oksigeno".

- Kial vi havas tiujn botelojn?

- Nu, mi iris al trinkejo de IKEA kaj mi petis iom da akvo...

(Carlo Sarandrea en "soc.culture.esperanto". *Kaptita en Interreto*)

MORTIS MARJORIE BOULTON.



Marjorie Boulton mortis merkredon posttagmeze. "Ŝi estis 93-jaraĝa." Lau sciigo de Geoffrey Greatrex.

(Renato Corsetti. 31/08/2017)

Malĝojiga novaĵo... malgraŭ ŝia maljunaĝo kaj lastatempa malbona sanstato.

Bedaŭros ne nur la Akademio, sed amantoj de ŝiaj verkaro, katamantoj kaj e-istoj.

Ŝi cetere estis verŝajne la lasta akademiano kiu ne uzis reton...

(Amri Wandel. 31/08/2017)

UNESKO-KURIERO EN ESPERANTO ELDONIĜIS.

"Unesko-Kuriero" estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en 1946. Kiel grava komunikilo por disvastigi la ideojn de Unesko kaj promocii la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la misiojn de Unesko en la kampoj pri kiuj ĝi respondecas.

Antaŭ jaroj, multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu ĝin ankaŭ en Esperanto. Amaso da retaj mesaĝoj bombe ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiuj kelkfoje respondis: "se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de Unesko-Kuriero." (el Eventoj, n-ro 182, 2/marto, 2000). Bedaŭrinde la revuo devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj. Ekde tiam malaperis la penado ĉe la esperantistaro.

En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora "Unesko-Kuriero" en formato A4, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de Unesko-Kuriero en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio. Dank' al kortuŝa kunlaboro de 36 tradukintoj kaj provlegintoj en 23 landoj, kaj financa subvencio de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio, la 1-a numero de "Unesko-Kuriero" en Esperanto estas eldonita. La du versioj en Esperanto estas same aspektaj kiel la UN-lingvaj versioj. La papera versio (ISSN 2521-7356) estos aĉetebla ĉe la libroservo de la 102-a UK kaj poste daŭre ĉe la Libroservo de UEA. La reta versio (ISSN 2521-7364) estas senpage elŝutebla ĉe UEA-retejo: http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero_1-2017.pdf

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 693. 2017-07-19)

Verŝajne ekzistas patronino de la esperantistoj (????).

Iam iu komentis al mi ke ekzistas la patronino de la esperantistoj. Mi nur trovis ian mencion en la hispana vikipedio. Mi kopias sube el vikipedio:

"(Hildegarda de Bingen) ... Alia el ŝiaj ĉefverkoj estis la kreado de "Lingua ignota", la unua artefarita lingvo en la historio, danke al kio ŝi estis nomumita patronino de la esperantistoj".

(L.N. 28/08/2017)

Vladimir Putjin menciis Esperanton!



Vladimir Putjin, prezidanto de Rusio – kiel neantaŭanoncita honorgasto – la 20-an de aŭgusto malfermis la ĉi-jaran sesion de la tradicia internacia ĵaz-festivalo "Koktebel Jazz Party" en Koktebel, artista vilaĝo en Krimeo, kie li diris i.a.: *"Muziko - ĝi estas lingvo, jen ĝi estas Esperanto, internacia lingvo, kiu unuigas homojn."*

En la festivalo "Koktebel Jazz Party" ekde 2003 partoprenis 150 konataj ĵaz-koletivoj de la mondo, ĉi jare alvenis 10 grupoj.

Elpaŝo de Putjin estis registrita kaj elsendita de pluraj rusiaj televidkanaloj, la registraĵo estas videbla ekzemple en la paĝo

<https://ru.sputnik.kg/video/20170821/1034805478/putin-na-koktebel-jazz-party.html>

(Szilvási László. Ret-Info / Lingvo-Studio, LS. <http://www.eventoj.hu>. 22/08/2017)

Greka eksa financministro pri Esperanto.



En la video (min. 22:10): https://diem25.org/event/live-chat-with-yanis-varoufakis/?instance_id=132, ĉ

Yanis Varoufakis (eksa greka financministro kaj bonega ekonomiisto) diras:

"Judith Meyer, nia kunordiganto pri volontuloj, proponus ke ni ĉiuj [ĉe DiEM25] lernu Esperanton kaj ke ni komuniku en Esperanto - estas ebleco. Se ni voĉdonas ke ni ĉiuj lernu Esperanton dum unu monato, tiam... mi mem lernus ĝin".

(R. Biurrun. 06/09/2017)

ĈU ESPERANTO-TRAJNO EN POLLANDO?

La interurbaj IC-traĵnoj havas proprajn nomojn ankaŭ en Pollando, kaj ofte oni decidas pri ili per voĉdonado. Ankaŭ nun, ekde unu semajno daŭras publika voĉdonado pri la trajno trafikonta inter la urboj Białystok kaj Łódź. Por la nomo estas tri kandidatoj: 1. Jagiellonczyk 2. Esperanto 3. Branicka.

Polaj esperantistoj ŝatus, se la trajno portus la nomon "Esperanto" – kaj bonvenigas voĉdonan helpon ankaŭ de eksterlandanoj – kiuj ja same povos veturi per tiu trajno.



<https://www.facebook.com/Ret.Info/posts/1476969229049181>

Estas granda lukto inter la du kandidatoj "Jagiellonczyk" kaj "Esperanto", dum la semajno plurfoje ili interŝanĝis la lokon sur la unua pozicio. Kvanton de la ricevitaj voĉoj vi povas vidi, se vi movas la muso-kursoron super la signon: "...". Antaŭ kelkaj jaroj foje trajno jam ricevis la nomon Esperanto, sed ĝi ne plu ekzistas, kaj ne plu trafikas.

(Szilvási László. 01/09/2017)